

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.

AKTIVAĴOJ en HEROUVILLE St CLAIR

Invitita de nia klubo kaj de la asocio **Amitié Solidarité Tikhvine, Mikaelo Bronŝtejn** prelegis la 12an de novembro pri « Kiel fartas nun mia urbo Tikvin kompare kun la soveta epoko ? ».

Ĉeestis trideko da loĝantoj, duonparte esperantistaj, por informiĝi kaj interŝanĝi pri tiu mezgranda urbo en la St Peterburga distrikto.

Mikaelo estas konata de la eruvila loĝantaro ĉar li jam plurfoje prelegis pri diversaj temoj : historio de sia uzino, travivaĵoj en Vorkuta, ktp.

Li estas tre lerta preleganto egale en la rusa kaj en esperanto, vigla, afabla, humurplena. Ankaŭ konata kiel verkisto, tradukisto, kantisto, li estas ofte invitita kiel preleganto en multaj landoj. Sed, probable, **Hérouville Esperanto** estas unu el la plej de li vizititaj kluboj ĉar Tikvin kaj Hérouville ĝemelas jam de 1991. De tiu jaro, ni tre regule rilatas kun la Tikvina klubo : korespondado kaj multaj akceptoj en ambaŭ urboj.

En la sama periodo, dum tri semajnoj, **8 klubanoj vizitis Japanion**. Tiu vojaĝo, mirinda kaj eksterordinara, estis tre serioze preparita de **Gérard kaj Gigi Senecal**. Tiu paro jam dufoje vizitis tiun azian insulegon. Imagu, revu (kaj spertu vi mem) tian vojaĝon kies akceptoj, tranoktado, ĉiĉeronado, estis faritaj de japanaj samideanoj. Dum tri semajnoj, la etoso estis esperantista kaj japaneca. . Ne forgesbla ! Gérard nun muntas filmeton por raporti pri tiu sekvinda aventuro.

Kadre de la Jaro de la Lingvoj, ni invitis **Ĵak Le Puil** kaj **Armela LeQuint** prelegi ĉe la urba biblioteko de Hérouville St Clair pri tradukarto. Ĉeestis proksimume 50 homoj, grandparte esperantistaj.

Ĵak kaj Armela jam famas ne nur pro pluraj tradukitaj verkoj, sed ankaŭ ĉar la de ili elektitaj verkistoj pritraktas ofte provokemajn temojn : Amélie Nothomb, Sade, Céline.*

Per taŭgaj ekzemploj, ili klarigis kiujn gramatikajn lingvaj kaj stilajn kaptilojn oni preterpasu aŭ solvu dum tradukado.

Por tion ilustru, pluraj eltiraĵoj estis lerte legitaj en esperanto de Armela kaj Ĵak, kaj en la franca dank'al interveno de loka legadasocio « **Larimaquoi** ».

Por konkludi tiun vesperon, Ĵak regalis nin per kelkaj kanzonoj : ni ne forgesu, ke li ankaŭ famas kiel kantisto en Esperantujo.

Yves NICOLAS

- *Florville kaj Courval, de Sade (5 €)*
- *Higieno de l'murdisto, de A. Nothomb (9 €)*
- *Vojaĝo ĝis noktofino, de Céline*

Le Puil ĉefredaktas la revuon 32 jaran « La Kancerkliniko », monatan satirgazeton por pli bone farti... Abono 2009 : 25 €. Ĵak Le Puil, « Les Cocherats », 18 210 Thaumiers



**HUNGARIO 1982 34a
Kongreso de IFEF
(Fervojistoj)
en Balatonfured**

En tiu numero :

Migal-kaptado.	2
Montara Vilaĝo.	2
Niaj Ĝeneralaj Kunvenoj.	3-4
Anatomio.	4
Kiel pri Esperanto informu. Claude Piron.	5-6
Listo de kotizintoj.	6

MIGAL-KAPTADO

Kion mi rakontos okazis en 1973 en Bangio, ĉefurbo de la Centrafrika Respubliko. Mi tie loĝis de tri jaroj en domo kun granda ĝardeno, iom ekster la urbocentro.

Iam en la laborejon venis kolego portanta ŝuskatolon, kiun li apertis antaŭ la ĉeestantaro kun mistera mieno. En ĝi troviĝis granda mortinta migalo, kiun li intencis naturigi kiel memoraĵo de Afriko. Mi konfesas ke mi estis tre interesata, kaj ke mi ja deziris ankaŭ havi tian malkutimaĵon. Mi do demandis kie kaj kiel kapti migalojn.

- Tutsimplas, diris la kolego, ĉie estas da ili, eĉ en via propra ĝardeno, ili kun certeco multnombros ; sel ili estas tre timemaj kaj vi neniam ilin rimarkis ; ili vivas subtere, kaj eliras el siaj truoj nur nokte por ĉasi ; ili neniam malproksimiĝas el tiuj truoj de pli ol kelkaj metroj, kaj tuj reen-truiĝas okaze de bruoj.

Kaj li priskribis la vivmanieron de la besteto : ĝi loĝas en subtera poŝo de dimensioj de pampelmuso, je proksimume 50 cm sub la surfaco, kun kiu ĝi komunikas per ovaŝekca tunelo de kvar centimetroj larĝaj ; tiu tunelo oblikve enprofundiĝas en la teron laŭ ĉirkaŭ unu metro. Dumnokte, en ĝi je kvin centimetroj de ĝia aperturo, la migalo ĝenerale atendas apudan pasadon de predo.

Mi diris ke fakte mi estis ofte vidinta sen aparta atento, ovalajn truojn en mia ĝardeno.

- Do, faru la provon, diris la kolego : dumtage bone situigu la lokon de truo, kaj nokte senbrue al ĝi iru kun estingita elektra lampo kiun vi subite lumigos direkten al la truo. Vi vidos !

Mi tion faris, kaj vidis ! Je dek centimetroj ekster la truo, estis monstra araneo ; sub la luma fasko ĝi lante retroiris en la truon, sed restis apud la aperturo kun siaj vilozaj kruoj kuntiritaj.

Mi rakontis la okazaĵon al la kolego, kaj li eksplikis min kiel kapti migalon. Necesis kuraĝe per pioĉo kaj ŝovelilo kavi proksimume 300 litrojn da tero sekvante la tunelon. Por ne ĝin perdi pro falo de tero en ĝi, necesas antaŭ ol komenci enprofundigi laŭ 20 cm, per bastoneto, ĉifonon en la truon. Kiam oni retrovas la komencon de la ĉifono, oni denove enŝoviĝas ĝis en la tunelon, kaj reas. Post deko da tiaj manovroj, oni fine alvenas al la restadejpoŝon de la migalo ; ĉirkaŭ la fino oni devas tre atente ŝoveli por ne difekti la beston per tero aŭ per la ŝovelilo. Kiam oni ĝin atingas, ĝi minace leviĝas sur la malantaŭaj

kruoj, saltegas ĝis foje kapable eliri el la kavaĵo kaj rapidege forkuri ; oni devas do esti pretiginta reton kiu preventos tion, ĝin tuj ĵetante en la kavaĵon. Oni metas poste sub la reto apertitan vitran bokalan, kaj per bastoneto iom post iom enŝovigas la migalon en la ujon... kiun oni poste rapide fermas.

Mi tiel kaptis tri/kvar migalojn, kiujn mi bredis en fermita speciala areo, ilin nutrante per viandopecetoj kiujn oni devis piki ĉe ekstremaĵo de vertikala stangeto, deko da centimetroj super la ternivelo.

Henri ROUSSEAU

Montara vilaĝo de CHUN-CHAN YEH Ĉina Esperanto-Eldonejo

En nia kluba biblioteko dormetas tre interesa romano eldonita en 1974, « Montara vilaĝo ». Ĝi pritraktas malbone konatan periodon de moderna Ĉinio kiam eksplodis la unuaj bataloj de la komunistaj revoluciuloj, en 1927.

La rakonto okazas en vilaĝo kies loĝantoj tute fremdas al la ideo mem de revolucio aŭ de socia progreso. Ili vivas sub la jugo de la tradicio kaj respekto al la lokaj moŝtoj. Sed malgraŭ tre granda malriĉeco, tia vivo aspektas normala por tiuj kamparanoj kiuj nenion alian travivis aŭ povis imagi. La aŭtoro tre lerte priskribas iliajn travivaĵojn kejkfoje ridindajn aŭ komikajn, sed plej ofte tristajn. Dank'al li ni bone komprenas kiel la loka registaro postulas de ili multe da povraj bienaĵoj eĉ dum la malsatsezonoj. Ni ankaŭ observas kiel la kamparanoj ne komprenas la tumultojn : revolucio estas nur ŝanĝo de disnatio. Ĉu malprave ?

La romano estas atentokapta ĉar okazas multaj eventoj kun tre tipaj roluloj. Ĝi tute ne estas dogma.

La aŭtoro, Chun-Chan Yeh, esperantisto, estas sperta tradukisto al la ĉina de internaciaj verkistoj : Tolstoj, Mérimée, Andersen, Ibsen, Federico Lorca kaj aliaj. Sed tiun romanon li verkis en la angla.

Esperantigis William Auld (1924-2006), probable unu el plej elstaraj verkistoj en Esperantujo. Lia traduko estas ĝuinda. De li mi konsilas ankaŭ legi la tri volumojn de « La kunularo de l'ringo » de JRR Tolkien kaj, de la sama aŭtoro « La Hobito » (pri tiu lasta tradukis la tekston Christopher Gledhill kaj la poemojn William Auld).

Klubanoj miaj ne permesu al tiu libro dormeti sur sia breto ! Normandanoj mendu ĝin ĉe esperanto librovendejoj. Espereble ĝi ne elĉerpiĝis... **IGREKEN**

Niaj regionaj Kongresoj kaj / aŭ Ĝeneralaj kunvenoj**Paĝo 3a**

30a Kongreso aŭ Ĝenerala Kunveno	Les Andelys (27)	6/7an de Majo 1961	Prezidanto : Sro Huet (Le Havre).
31a Kongreso	Rouen (76)	5/6an de Majo 1962	Prezidanto : Sro Huet.
18a Kongreso de SAT-Amikaro en Rouen. 13/16an de Aprilo 1963.			
	Evreux (27)	9an de Junio 1963	Nord-Normanda Renkontiĝo.
	Caen (14)	19an de Majo 1963	Sud-Normanda Renkontiĝo.
32a Kongreso	Lisieux (14)	25/26an de Aprilo 1964	Prezidanto : Sro Huet.
57a Kongreso de U.F.E. en Le Havre. 5/7an de Junio 1965.			
33a Kongreso	Yvetôt (76)	29/30 de Aprilo 1967	Prezidanto : Sro Huet.
26a Kongreso de SAT-Amikaro en Yvetôt. 10/13 Aprilo 1971.			
34a Kongreso	Rouen (76)	27/27an de Majo 1972	Prezidanto : Sro Jouis (Boisguillaume).
35a Kongreso	Grand Quevilly (76)	16/17 de Marto 1974	Prezidanto : Sro Quillaud. (Grand Quevilly).
36a Kongreso	Val de Saône (76)	10/11an de Majo 1975	Prezidanto : Sro Quillaud.
37a Kongreso	Yport (76)	8/9an de Majo 1976	Prezidanto : Sro Quillaud.
38a Kongreso	Ouilly le Vicomte (14)	23/24an de Aprilo 1977	Prezidanto : Sro Quillaud.
39a Kongreso	Rouen (76)	22/23an de Aprilo 1978	Prezidanto : Sro Quillaud.
40a Kongreso	Le Havre (76)	19/20an de Majo 1979	Prezidanto : Sro Quillaud.
41a Kongreso	Asnelles sur Mer (14)	22/23an de Marto 1980	Prezidanto : Sro Quillaud.
42a Kongreso	Mortain (50)	16/17an de Majo 1981	Prezidanto : Sro Quillaud.
43a Kongreso	Etretat (76)	2/3an de Oktobro 1982	Prezidanto : Sro Quillaud.
44a Kongreso	Bayeux (14)	6/7an de Oktobro 1984	Prezidanto : Sro Quillaud.
45a Kongreso	Port Bail (50)	4/5an de Oktobro 1986	Prezidanto : Sro Pottier (Yvetôt).
46a Kongreso	Houlgate (14)	3/4an de Oktobro 1987	Prezidanto : Sro Pottier.
80a U.F.E. Kongreso en Rouen. 20/24 de Majo 1988.			
47a Kongreso	Rouen (76)	4an de Decembro 1988	anstataŭ : Veules les Roses (76) : nuligita.
48a Kongreso	Yvetôt	8an de Oktobro 1989	Prezidanto : Sro Pottier.
49a Kongreso	Hérouville St Clair (14)	20/21an Oktobro 1990	Prezidanto : Sro Pottier.
50a Kongreso	Le Havre (76)	12/13an Oktobro 1991	Prezidanto : Sro Pottier.
48a Kongreso de SAT-Amikaro en Hérouville Saint Clair. 9/13an de Aprilo 1992			
51a Kongreso	Rouen (76)	10an de Aprilo 1994	Prezidanto : Sro Pottier.
52a Kongreso	Rouen (76)	24an de Marto 1996	Prezidanto : Sro Pottier.
53a Kongreso	Le Havre (76)	22an de Marto 1997	Prezidanto : Sro Pottier.
54a Kongreso	Hérouville St Clair (14)	28an de Marto 1998	Prezidanto : Sro Pottier.
55a Kongreso	Saint Lô (50)	11an de Aprilo 1999	Prezidanto : Sro Nicolas (Hérouville Saint Clair).

56a Kongreso aŭ Ĝenerala Kunveno	Rouen (76)	2an de Aprilo 2000	Prezidanto : Sro Nicolas (Hérouville Saint Clair).
57a Kongreso	Jullouville (50)	17/18an de Majo 2003	Prezidanto : Sro Nicolas.
58a Kongreso	Hérouville St Clair (14)	19an de Junio 2005	UNE + Normanda Federacio de UFE kunfandiĝas Naskiĝo de « Esperanto Normandie ». Prezidanto : Sro Erhard. (Canteleu).
<i>Nacia Kongreso de Francaj Esperantistaj Fervojistoj en Port Bail (50). 7/14an de Aprilo 2006.</i>			
59a Kongreso	Port Bail (50)	9an de Aprilo 2006	Prezidanto : Sro Erhard.
60a Kongreso	Grand Quevilly (76)	25an de Marto 2007	Prezidanto : Sro Erhard.
61a Kongreso	Betteville (76)	24/25an de Majo 2008	Prezidanto : Yves Nicolas (Caen)
62a Kongreso aŭ Ĝenerala Kunveno	?	?	?

Resume : ni kongresis aŭ partoprenis en Ĝenerala Kunveno en :

Haute Normandie : 44 foje.

(76 - Seine Maritime) : 38 foje.

14 foje en Rouen, 9 en Le Havre, 3 en Sotteville les Rouen, 2 foje en Fécamp, Grand Quevilly, Yvetôt, 1 en Betteville, Bolbec, Elbeuf, Etretat, Val de Saâne, Yport.

(27 - Eure) : 6 foje.

4 foje en Evreux, 1 foje en Les Andelys kaj Louviers.

Basse Normandie : 20 foje.

(14 - Calvados) : 14 foje.

3 foje en Caen, Hérouville Saint Clair, Lisieux, 1 foje en Asnelles, Bayeux, Honfleur, Houlgate, Oully le Vicomte.

(50 - Manche) : 5 foje.

2 en Port Bail, 1 en Jullouville, Mortain, Saint Lô.

(61 - Orne) : 1 foje.

1 en Domfront.

Estas tre interesa laboro kiu okazigas oftajn re-tajn interŝanĝojn.

En la lasta teksto kiun li sendis al mi temas pri grava kunveno de firmaaj dungitoj.

Ie Mikaelo skribas, ke la fabrikestro, Petrovskih, admonas sian subulon, kaj por tion priskribi Mikaelo jene verkis : "evidente, skuis Petrovskih lian voston pro kelkaj reklamacioj"

Jen mia rimarko al Mikaelo :

"evidente, skuis Petrovskih lian voston pro kelkaj reklamacioj" sonas iom strange por franca orelo (kaj en aliaj lingvoj ?), ĉar en la franca oni tre kutime nomas la kacon voston. Eble vostonkuado mildigus la laborrilatojn en la francaj firmaoj... »

Jen la respondo de Mikaelo :


Ha-ha! Dume mi ne scias, kion mi faru pri tiu vosto, kiu ne estas kaco... eble mi metu "draŝis lian pugon"? Iom banala tamen...

Konkludo : verki romanon en esperanto estas malfacila afero ĉar oni celas internacian publikon kies kulturaj referencoj tute malsimilas de iu lando al alia. Vosto estas tre esprim pova en nia lando dum en aliaj landoj, videble en Rusio, ĝi utilas nur por forbalai la muŝojn...

Yves NICOLAS

ANATOMIO

Mikaelo Bronshtejn, ruso jam delonge amiko de nia klubo, famas en Esperantujo pro prelegoj (antaŭ nelonge en Hérouville) kantoj, kaj libroj. Li nun verkas novan romanon en esperanto kaj regule sendas al mi malhetajn ĉapitrojn por ke mi ilin kontrolu kaj kritiku.



BRAZIL : 1936 :
Nacia Internacia
Specimena Foiro
Rio de Janeiro.

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures




1. "L'anglais donne un avantage aux anglophones, c'est injuste, en revanche, l'espéranto, lui, met tout le monde sur le même pied".
2. "En Europe, 94% de la population sont incapables de comprendre correctement un spécimen d'anglais courant.
3. L'anglais est peu adapté à l'usage international, du fait de sa prononciation, de son orthographe, de sa grammaire floue, de son imprécision et du fait que le sens de ses mots s'écarte souvent de l'usage international (p.ex. "eventual" veut dire "final", alors que dans toute l'Europe continentale le mot existe dans le sens d'"éventuel".) **Atentu!** Ne enkonduku tiun 3-an punkton, se vi ne havas pretajn ekzemplojn. Estas tre embarase ne povi pruvi aserton, kiun oni ĵus faris, se la intervjuanto ĝin kontestas.

Ne forgesu, ke multaj personoj imagas, ke ili perfekte regas la anglan kaj tre fieras pri tio. Oni ne esprimu sin malestime por homoj, kiuj defendas la anglan. Oni nur montru, ke Eo estas supera, ĉar pli facila (vi povas diri: "à âge égal et à nombre égal d'heures hebdomadaires, les élèves atteignent en espéranto en six mois une capacité de communication qu'ils n'ont en anglais qu'au bout de six ans".)

Se la intervjuanto demandas vin: "Kiel vi dirus ... en Eo?" kaj vi ne tuj trovas la tradukon, diru, ke certe estas eble esprimi tiun ideon, sed ke vi ne tuj trovas ĝin. Vi povas diri, ke profesiaj tradukistoj ofte ne tuj trovas ĝustan tradukon. Se estas tre tipe franca esprimo, vi povas diri: "Kiel vi dirus tion en la angla?" Ĝenerale la persono ne kapablas respondi. Aŭ vi povas diri: "Vous savez l'anglais?" aŭ "Vous avez appris l'anglais? Combien d'années?" kaj poste demandu: "Comment dites-vous **frileusement** en anglais?"

Praktike neniu kapablas respondi. Vi do povas diri: "kaj tamen la angla estas lingvo, kiu funkcias, ĉu ne?" La ideo estas demonstri, ke estas stulte atendi de iu ajn, kiu scipovas lingvon, ke li aŭ ŝi kapablu tuj ĉion traduki en la koncernan lingvon, kaj dedukti ion pri la lingvo el lia ne tuja kapablo traduki... »

Claude PIRON



**Poŝtmarko eldonita
en Brazilo 1937 :
19a de januaro pri la
Naŭa Brazila
Kongreso de
Esperanto**

**Si vous désirez recevoir gratuitement les
prochains bulletins en couleur, par
Internet, selon le format « PDF », envoyez-
nous votre adresse par courriel à :
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr**

KVINa listo de kotizintoj por 2008

2008 : DUFOSSE, LANGEAIS.

TRIA listo de kotizintoj por 2009

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba **TRIA** listo : *Ge-Sinjoroj* :

*BESSIERE, DUBUC, DUFOSSE, GROULT, GUEROULT, GUILMOT, HUBERT,
LANGEAIS, LEPREVOST, LEROY, LONGUET, MARIE, QUILLAUD, RAUCH,
ROBIOLLE, TAILPIED.*

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**
Abon-kotizo por 2009 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto : .

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

Claude Piron pri : « Kiel pri Esperanto informu »

« Miaopinie, plej grave estas scii, kion oni nepre evitu diri. La plej multaj fuŝoj, kiuj malutilas al Eo, radikas en la uzo de formuloj, kies psikologia efiko estas aperigi Eon malsimpatia. Eo sentiĝas malsimpatia, se la persono kredas, ke estas miksaĵo, ke ĝi estis farita rapide de unu homo, ke ĝi ne sukcesis, ke ĝi povas esti nur elementa, primitiva, malriĉa.

1. Miksaĵo. Eblas diri: multaj miksaĵoj estas tre harmoniaj, ekzemple *"salade niçoise"*, aliflanke, ĉiuj lingvoj estas miksaĵoj, fakte unu el la plej heterogenaj lingvoj estas la angla. Miksaĵo estas io negativa nur, se ĝi ne estas harmonia, se mankis asimilan faktoron. En Eo tia asimila principo bonege funkcias, kontraste kun la angla lingvo, kiu ne kapablas asimili (tial la sama sono skribiĝas /k/ en **king** sed /c/ en **courage**).

2. Farita de nur unu homo, artefarita. Oni komprenigu, ke la nuna Eo estas rezulto de unu jarcento da uzado fare de homoj el plej diversaj kulturoj. Tiurilate estas esprimoj, kiujn oni nepre ne uzu. Oni ne diru *"langue planifiée"*, *"langue artificielle"*, *"langue construite"*, aŭ *"langue inventée"*, oni diru *"langue conventionnelle"*.

Oni neniam uzu la esprimon *"de toutes pièces"*. Oni evitu ankaŭ *"langue créée"*, kaj certe neniam diru (kiel multaj vortaroj) *"créée en 1887"*, ĉar tio donas la impreson, ke antaŭ 1887 estis nenio, kaj post 1887 ekzistis la tuta Eo. Fakte, la komponado de Eo estis longa procezo, 1887 estas nur la dato de publikigo, kaj krome la nuna Eo multilate diferencas de la lingvo de 1887. Oni diru *"langue qui s'est développée naturellement, par l'usage, sur la base d'un projet exposé dans une petite brochure"*. Oni uzu ankaŭ esprimojn kiel *"langue née de la communication internationale (et donc particulièrement bien adaptée aux exigences de la communication internationale)"*. Tio estas vera, ĉar la nuna Eo rezultas el jarcento da internacia uzado. Ĉio, kio komprenigas, ke Zamenhof estis nur la iniciatinto, kaj ke la lingvo fariĝis vivanta lingvo ĉar homoj ĝin efektive uzis en la praktiko, agas efike. Uzu vortojn kiel *"nature"*, *"spontane"*. Diru *"toute langue vivante résulte d'un processus collectif, spontané et anonyme, en grande partie inconscient et l'Eo ne fait pas exception"* estas efike. Pri **"artefarita"** oni diru ankaŭ, ke pano, hundoj, rozoj ne ekzistus se homoj ne estus aplikintajn siajn talentojn al naturo. Same faris Zamenhof kaj post li la e-istoj (*"ĉefe la verkistoj"*), vi povas aldoni, kio nerekte komprenigas, ke Eo havas literaturon). Oni ankaŭ povas rimarkigi, ke *"artificiel"* signifas, etimologie, *"farita kun arto"*, *"arte farita"*.

Paĝo 5a

3. Malsukceso. Oni emfazu, ke Eo funkcias perfekte inter tiuj, kiuj lernis ĝin, kaj tiuj estas disvastigitaj sur la tuta terglobo. Por tiuj ĝi bonege sukcesis. Ĝi bonege funkcias interrete. Homoj, kiu riproĉas, ke ĝi ne sukcesis, ne konsideras la malrapidan ritmon de historio. La metra sistemo estis proponita en 1660. Ĉu vi rajtus diri, cent jarojn poste, ke ĝi fiaskis, ĉar ĝi estis nenie uzata? Ne, ĝi tiam ankoraŭ ne sukcesis. Sed nun ĝi praktike konkeris la mondon. Eo post unu jarcento montriĝas pli sukcesa ol la metra sistemo post simila tempodaŭro. Laŭ la maniero, laŭ kiu la intervjuo disvolviĝas, oni povas ankaŭ diri jenon: "Ĉu por vi, sukcesi signifas, ke la tuta mondo devis adopti ĝin? Ĉu vi dirus, ke la 2CV estis fiasko, ĉar multegaj homoj neniam aĉetis 2CV? Laŭ mi, se tiuj, kiuj ĝin deziris, povis aĉeti ĝin, uzi ĝin, kaj estis pri tio kontenta, ĝi sukcesis."

4. Malriĉa. Oni diru simple: "Ne, ĝi ne estas malriĉa. Riĉeco dependas, ne de la nombro de elementoj, sed de ilia kombinpovo. Nia alfabeto kun 26 literoj estas same riĉa kiel lingvo kun dekmiloj da ideogramoj. Ĝi kapablas esprimi same profundajn pensojn. Ĉio en la naturo konsistas el nur kelkaj bazaj elementoj; karbono, hidrogeno, nitrogeno (azoto), oksigeno kaj kelkaj aliaj. Kaj tamen la estaĵoj kunmetitaj el tiuj malmultaj elementoj estas nekredinde diversaj. Se vi legas E-an poezion, vi rimarkos, ke ĝis estas same riĉa kiel la aliaj literaturaj lingvoj."

Plej efike estas nerekte enkonduki la deziratajn ideojn. Se vi, kvazaŭ preterpase, diras *"L'autre jour, je parlais en espéranto avec un Coréen, quand..."* tio estas multe pli efika ol diri "Estas e-istoj en Koreio". Efikeco de intervjuo dependas de la ideoj, kiujn vi **semas**. Ideo pli bone fiksiĝas en cerbo, se ĝi estis nerekte prezentita, ĉar rekta prezento ofte tuj elvokas reziston. Pli gravas prononci kelkajn ĝustajn frazojn pri Eo ol ĝuste respondi al demando. Provu do enŝovi mallongajn pozitivajn ideojn pri la lingvo, eĉ se ili ne tute precize rilatas al tio, kion oni demandis al vi. Same pli efikas ekzemploj el la vivo ol abstraktaj pruvoj. Se la intervjuanto diras, ke Eo ne povas esti riĉa, diru ekzemple: "Ĉu vere? Kiam mi legas romanon en Eo, mi ne trovas la lingvaĵon pli malriĉa ol kiam mi legas romanon en la franca." (Tio enŝovas la ideon: "ekzistas romanoj en Eo" kaj krome la ideon: "Mi parolas pri io, kion mi konas pro propra sperto, dum vi nur faras hipotezon pri io, kion vi ne konas").

Oni evitu esti agresemaj rilate la anglan. Eblas pritrakti la temon tute trankvile, rapide prezentante tri ideojn: